

## **Statuto de ILEI**

La sekva teksto prezentas la aktualan tekston de la Statuto de ILEI ekde la 44a Konferenco de ILEI en Kopenhago (Julio, 2011).

Aparta markita versio de la nuna dokumento signas la modifitajn alineojn, kune kun tiuj, kies modifoj estas ankoraŭ sub diskuto, interalie ĉe la Komisiono pri Regularoj.

Simila dokumentoparo estas kreota pri la Interna Regularo. Restos je dispono la dokumentoj uzitaj en Kopenhago kun la precizaj teksto-modifoj kaj iliaj rezultoj.

## **STATUTO**

de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj  
aprobita dum la komitatkunsido  
de la 32a Konferenco,  
la 12an de aŭgusto 1998 en Montpellier, Francio  
kaj modifita en la 44a Konferenco  
en Kopenhago, Danio, la 19an de julio 2011.

## **INTERNA REGULARO**

Lastaj modifoj:

Julio 2011 en Kopenhago

Marto 2012 laŭ komitata retvoĉdono

Julio 2012 en Kunmingo

Tiu ĉi regularo estas por interna uzado de la Ligo kaj celas kompletigi la Statuton. La numerado de la artikoloj sekvas tiun de la Statuto. Se iu artikolo el la Statuto ne estas menciita en ĉi tiu regularo, ĝi ne bezonas aldonon.

La Interna Regularo estas, post ŝanĝiĝoj, aprobita en la komitatkunsido de la 32a ILEI-konferenco la 12an de aŭgusto 1998 en Montpellier, Francio.

## **Artikolo 1**

### **IDENTECO**

- 1.1 La nomo de la organizo estas "Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj"; mallonge "I.L.E.I."
- 1.1 La estraro proponas oficialajn versiojn de la ligo nomo en aliaj lingvoj; tiujn aprobas la Komitato.
- 1.2 En la sekva teksto de tiu ĉi Statuto ĝi estas nomita "la Ligo".

## **Artikolo 2**

### **DIFINOJ**

- 2.1 La Ligo estis fondita en la jaro 1949 por nelimigita tempo.
- 2.2 La Ligo estas faka organizo pri edukado kaj instruado.
- 2.2 La Ligo estas aliĝinta faka asocio al Universala Esperanto-Asocio.
- 2.3 La Ligo estas demokratia organizo, memstara en rilatoj kun aliaj organizoj kaj institucioj.
- 2.4 La bazaj principoj por la Ligo estas tiuj de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj la Universala Deklaracio de la Rajtoj de la Infano.
- 2.5 La Ligo havas sian sidejon en Nederlando, jure rekonita de la komerca ĉambro de la Haga regiono, numero 27181064
- 2.6 La oficiala lingvo de la Ligo estas la internacia lingvo Esperanto.

## **Artikolo 3**

### **CELOJ**

La celoj de la Ligo estas:

- 3.1 Edukado al estimo de la homo kaj al respekto al la vivo kaj al la naturo.
- 3.2 Progresigo de la interkompreniĝo inter la popoloj.

#### **Artikolo 4**

#### **TASKOJ POR ATINGI LA CELOJN**

- 4.1 Unuigi instruistojn kaj instruantojn esperantistajn en la mondo por sisteme labori por la enkonduko de Esperanto en ĉiuspecajn lernejojn kaj por celtaŭga instruado de Esperanto.
- 4.2 Atenti, esplori kaj analizi pedagogiajn problemojn en la lingvo-instruado kaj labori por solvi ilin.
- 4.3 Iniciati, organizi kaj subteni sciencajn esplorojn pri la instruado de lingvoj.
- 4.4 Organizi interŝanĝojn de spertoj el la pedagogiaj scienco kaj praktikado por plibonigo kaj modernigo de la instruado de lingvoj, speciale de Esperanto.
- 4.5 Organizi diversspecajn internaciajn aranĝojn cele al interkompreniĝo pere de la internacia lingvo.
- 4.6 Organizi pedagogiajn konferencojn kaj laborkunvenojn.
- 4.7 Aranĝi internaciajn ekzamenojn pri kapablo en apliko kaj instruado de Esperanto.
- 4.8 Kontakti kun registaraj kaj edukaj instancoj kaj kun aliaj organizaĵoj kies celoj estas konformaj al tiuj de la Ligo.
- 4.9 Publikigi eldonaĵojn kaj komunikaĵojn.
  - 4.9.1 La oficiala organo de la Ligo nomiĝas "Internacia Pedagogia Revuo", mallonge "IPR". (Literatur-referenca mallongigo: Int.Pedag.Rev.) IPR aperas minimume tri fojojn en la jaro.
  - 4.9.2 La Ligo eldonas internacian Esperanto-revuon por lernejoj kaj komencantoj, Juna Amiko.

- 4.9.3 Pri aliaj eldonaĵoj decidas la estraro.
- 4.9.4 La Estraro nomumas kaj malnomumas la redaktorojn de siaj revuoj kaj aliaj kompilitaj eldonaĵoj.
- 4.10 Apliki aliajn leĝe permesitajn rimedojn.

## **Artikolo 5**

### **MEMBRECO**

- 5.1 Ĉiu persono kiu rekonas la Statuton, okupiĝas aŭ interesiĝas pri edukado kaj instruado, rajtas membriĝi.
  - 5.1.1 Membreco validas por unu jaro kaj plilongiĝas per la sama periodo.
- 5.2 Membroj distingiĝas en sekciaj membroj kaj individuaj membroj.
  - 5.2.1 Membroj kiuj aliĝas pere de sekcio estas Sekciaj Membroj. Membroj loĝantaj en teritorio kie ne estas sekcio, aŭ kiuj aliĝas rekte al la internacia ILEI, estas Individuaj Membroj.
  - 5.2.2 Ĉiu membro povas fariĝi Dumviva Membro pagante dudekoblan jarkotizon.
  - 5.2.3 Honora Membro estas nomita surbaze de siaj meritoj por la Ligo aŭ por la instruado de Esperanto kaj ekde la honorigo ne plu devas pagi membrokotizon.
- 5.3 Fino de membreco okazas pro:
  - 5.3.1 deziro de la membro;
    - 5.3.1 Membro povas fini sian membrecon per skriba sciigo al la Ligo aŭ al la Sekcio.
  - 5.3.2 kontraŭstatuta ago de la membro;
    - 5.3.2.1 La Ligo aŭ la Sekcio povas eksigi membron pro kontraŭstatuta ago. Ankaŭ unujara nepago de la kotizo estas kontraŭstatuta ago.

- 5.3.2.2 Kontraŭ la sub 5.4.1 nomita decido eblas apelacii ĉe la Komitato ĝis unu monato post la ricevo de la sciigo. Tiukaze la eksigo estas prokrastata ĝis la decido de la Komitato.
- 5.3.3 forpaso de la membro.
- 5.3.3 Pri forpaso de membro la Ligo estu informita kiel eble plej baldaŭ.
- 5.4 La membroj havas la rajton:
  - 5.4.1 ĉeesti ĉiujn kunsidojn de la Komitato;
  - 5.4.2 ricevi la oficialan organon de la Ligo, ĉu en fizika; reta aŭ alia formo.
  - 5.4.3 starigi demandojn kaj doni konsilojn al la instancoj nomitaj en artikolo 7.

## **Artikolo 6**

### **FINANCAJ RIMEDOJ**

La financaj rimedoj de la Ligo estas:

- 6.1 membrokotizoj;
  - 6.1.1 Kotizoj de sekciaj membroj devas esti pagitaj al la sekcio antaŭ la unua de marto. La sekcioj devas raporti tiujn membrojn al ILEI antaŭ la 31-a de marto. Individuaj membroj laŭeble membriĝu antaŭ la 31-a de marto.
- 6.2 donacoj;
- 6.3 rentoj kaj heredaĵoj;
  - 6.3.1 Heredaĵoj estas akceptataj sub kondiĉo de registrado de la inventaro.
- 6.4 aliaj enspezoj.

## **Artikolo 7**

### **ORGANIZA STRUKTURO**

La kernaj instancoj de la Ligo estas:

- 7.1 la Komitato;
- 7.2 la Estraro;
- 7.3 la sekcioj kaj la reprezentantoj.

LA KOMITATO:

7.1.1 estas la supera decida instanco de la Ligo;

7.1.2 konsistas el komitatanoj, kiuj estas skribe delegitaj membroj;

7.1.2 La Komitato konsistas el sekciaj membroj, kiuj elektas komitatanojn laŭ la sekva tabelo:

membroj	5-14	15-34	35-49	50-99	100
komitatanoj	1	2	3	4	5

Por ĉiu plia kvindeko da membroj unu plian komitatanon. Unu komitatano havas unu voĉon. Mandato de komitatano estas trijara. La komitatano kiu dum sia mandato ĉeestis neniun komitatkunsidon sen skriba klarigo pri tio aŭ ne respondas al leteroj direktitaj al la komitatanoj, ne estas reelektebla. En komitatkunsido ĉeestanta komitatano povas reprezenti alia(j)n komitatano(j)n de la sama sekcio aŭ teritorio kiu(j) ne povas ĉeesti, kondiĉe ke tiu(j) alia(j) komitatano(j) skribe permesas tiun reprezenton. La ĉeestanta komitatano tiam havas la voĉo(j)n de la ne-ĉeestanta(j) komitatano(j).

7.1.3 kunsidas minimume unufoje jare;

7.1.3 Se la prezidanto kaj la vic-prezidanto de la Ligo ne ĉeestas en komitat-kunsido, la Komitato elektas la kunsid-estron.

7.1.4 decidas pri akcepto kaj/aŭ ŝanĝo de la Statuto kaj de la Interna Regularo;

7.1.5 rajtas nomi kandidatojn por la Estraro;

7.1.6 elektas la membrojn de la Estraro, el kiuj la prezidanton, la sekretarion kaj la estraranon pri financoj kiel funkciulojn;

- 7.1.6 La elekto de estraranoj okazas skribe. Kandidatoj estas elektitaj ricevinte la simplan plimulton el la validaj voĉoj. Sindetenoj ne estas validaj voĉoj. En kazo de unu kandidato la kunsidestro rajtas proponi voĉdonon per levo de la manoj. Eksiĝinta estrarano estas unufoje reelektebla, sed eblas pliaj fojoj se du trionoj la Komitato konsentas. En kazo de intertempa eksiĝo de estrarano la ceteraj estraranoj respondecas pri daŭrigo de ties laboro, ĝis anstataŭanto estas enpostenigita, kun helpo de la elekto-komisiono. La estraran elekton gvidas la prezidanto aŭ membro de la Elekto-Komisiono, aŭ – manke de tiu – alia komitatano, kiu ne estas kandidato por estrara posteno.
- 7.1.7 elektas la membrojn de la Kontrola Komisiono pri Financoj;
- 7.1.7 La Kontrola Komisiono pri Financoj konsistas el minimume du membroj; ĝi havas tri-jaran mandaton, kiu komenciĝas en la 1-an de januaro en la jaro post la estrarelekto. Pro la neceso fizike enrigardi dokumentojn dum revizorado, la komisionanoj prefere loĝu samlande kun la kasisto.
- 7.1.8 starigas kaj nuligas laborkomisionojn;
- 7.1.8 Laborkomisiono estas starigata por difinitaj tasko kaj tempodaŭro. Laborkomisiono konsistas el minimume tri membroj, el kiuj minimume unu estas komitatano. Komisiono havas prezidanton, kiu povas, sed ne devas, esti estrarano. Ĉiu komisiono havas respondecan estraranon, kiu sekvas ĝiajn laborojn. Laborkomisiono raportas al la estraro laŭ interkonsentita maniero. Pri financoj por laborkomisiono estu skriba interkonsento inter la laborkomisiono kaj la estraro.
- 7.1.9 pridiskutas kaj prijuĝas la laboron faritan de la Estraro, de la sekcioj, de la reprezentantoj kaj de la komisionoj;
- 7.1.9 Raporton de la prijuĝoj ricevas la estraro, la sekcioj kaj la komisionoj.
- 7.1.10 povas senŝarĝigi la Estraron;
- 7.1.10 La Komitato senŝarĝigas la estraron pri la finita administra jaro, se la prijuĝo pri la laboro de la estraro estas pozitiva.
- 7.1.11 decidas pri la sekvindaj gvidlinioj;
- 7.1.11 La gvidlinioj estas skribe fiksataj por minimume tri jaroj; intertempe ili povas esti adaptitaj.

- 7.1.12 decidas pri akcepto aŭ eksigo de sekcioj;
- 7.1.12 La Komitato povas malakcepti sekcion, se ekzistas gravaj duboj pri la ekzistopovo de la sekcio, kaj povas eksigi sekcion en kazo de kontraŭstatuta ago aŭ neplenumo de sia organiza devo.
- 7.1.13 povas senrajtigi komitatanon pro kontraŭstatuta ago;
- 7.1.13 Ĝi povas senrajtigi komitatanon, se la deleginta sekcio agis kontraŭstatute.
- 7.1.14 fiksas la membro-kotizon;
- 7.1.14 Ĝi fiksas la membrotizon por la sekva jaro.
- 7.1.15 prijuĝas la raportadon de la Kontrola Komisiono pri Financoj;
- 7.1.16 aprobas taskaron plenumota de pagata oficisto aŭ kompensata volontulo;
- 7.1.17 faras decidojn laŭ kvorumo, kiu konsistas el triono de la voĉdonrajtaj komitatanoj. Tiukaze ĝi decidus per simpla plimulto de validaj voĉoj (escepte en la kazoj nomitaj en 7.1.18 kaj en 7.1.6 de la Interna Regularo);
- 7.1.17 En kazo de egaleco de la validaj voĉoj rilate proponon pri aferoj, la propono estas malakceptita. La kunsidestro rajtas postuli duan voĉdonon, eventuale skriban. La membroj de la estraro havas voĉdonrajton, escepte de aferoj pri kiuj ili mem respondecas. En kazo de elekto de personoj validas la elekto-regularo.
- 7.1.18 decidus per minimume tri kvaronoj de la validaj voĉoj en kvoruma kunsido pri malfondo de la Ligo. Tiukaze ĉiu havaĵo de la Ligo estos donacita al edukaj instancoj, decidotaj de la Komitato.
- 7.1.18 En kazo de malfondo de la Ligo la temo devas esti anoncita minimume ses monatojn antaŭ la kvoruma kunsido pritraktonta la temon.
- LA ESTRARO:
- 7.2.1 gvidas la Ligon;



- 7.2.1 La Estraro rajtas fari operaciajn decidojn inter du kunsidoj de la Komitato, atentante la gvidliniojn nomitajn sub 7.1.11. Principajn demandojn ĝi diskutigas rete kun komitatanoj, kaj laŭbezzone okazigas retajn voĉdonojn, laŭ la koncerna regularo. Escepte tiujn de prezidanto, sekretario kaj estrarano pri financoj la estraranoj dividi la funkciojn inter si.
- 7.2.2 konsistas el minimume kvin kaj maksimume naŭ membroj kun trijara oficodaŭro inter kiuj prezidanto, sekretario, estrarano pri financoj, vicprezidanto kaj vicsekretario;
- 7.2.2.1 La Prezidanto:
- kunvokas kaj prezidas la kunsidojn de la estraro kaj de la Komitato;
  - reprezentas la Ligon en eksteraj rilatoj, sed rajtas delegi tiukampajn taskojn;
  - respondecas al la Komitato pri ĉiuj agoj de la estraro;
  - havas la rajton sin anstataŭigi.
- 7.2.2.2 La sekretario faras la protokolojn de la estrarkunsidoj kaj la komitato, tenas la kontakton kun la sekcioj, reprezentantoj, individuaj membroj kaj la komitatanoj, kompilas la estraran jarraporton kaj sendas la dokumentojn por la komitatkunsido al la komitatanoj.
- 7.2.2.3 La estrarano pri financoj registras ĉiujn en- kaj elspezojn de la Ligo, zorgas pri la enkasigo de la kotizoj, faras la finanĉan jarraporton, bilancon, kaj la buĝeton por la sekva jaro kaj sendas tiujn dokumentojn al la komitatanoj.
- 7.2.2.4 La ceteraj membroj zorgas pri:
- la organiza stato de la Ligo;
  - entrepreno kaj ebla efektivigo de agoj kiuj povas servi al la celoj de la Ligo.
  - realigo de agadplanoj kaj kunlaborigo de sekcioj en la kampoj sub sia respondecado.
- 7.2.3 okazigas la elekton de komitatanoj nome de la individuaj membroj;
- 7.2.4 faras proponojn al la Komitato;

- 7.2.4 La estraro sendas siajn kaj ricevitaĵajn proponojn por diskuto al la komitatanoj en sekva fizika komitatkunsido al la komitatanoj almenaŭ monaton antaŭ tiu kunsido. Tiuj proponoj havas prioritaton antaŭ poste aŭ surloke anoncigitaj proponoj.
- 7.2.5 raportas kaj respondecas pri siaj agoj al la Komitato;
- 7.2.5 La jarraporton kompilas la sekretario laŭ kontribuoj de estraranoj kaj komisiitoj. La estraro kune respondecas pri ĝi. Ĝi inkluzivas la financajn raportojn. Tiuj raportoj estas disponigitaj al komitatanoj almenaŭ unu monaton antaŭ la komitatkunsido.
- 7.2.6 rajtas proponi kandidatojn por estraraneco;
- 7.2.7 rajtas okazigi skribajn kaj retajn voĉdonojn de la komitatanoj;
- 7.2.8 rajtas nomi kaj anstataŭigi pagatajn oficistojn kaj kompensatajn volontulojn por taskoj aprobitaj de la Komitato laŭ artikolo 7.1.16;
- 7.2.9 rajtas inviti gastojn al siaj kunsidoj kaj al tiuj de la Komitato.
- SEKCIOJ KAJ REPRESENTANTOJ.
- 7.3.1 Sekcio agas en difinita teritorio.
- 7.3.1 Sekcioj agas en difinita teritorio, kiu estas priskribita interkonsente kun la estraro.
- 7.3.2 Sekcio povas esti fondata de minimume kvin membroj en tiu difinita teritorio, kiuj devas fariĝi en la jaro de la peto-ektrakto internaciaj membroj de ILEI.
- 7.3.2 Sekcioj strebas al leĝa stato, dezirinda por plifaciligi kontaktojn kun registaraj instancoj.
- 7.3.3 Sekcio nomas sekcian estraron, el kiu unu kiel sekciestron.
- 7.3.3.1 Sekciestro devas esti internacia membro de la Ligo en la jaro antaŭ la ekstrakto de sekcia aliĝpeto kaj resti membro tra la tuta mandato. Nove nomumita sekciestro devas esti kaj resti internacia membro de ILEI.
- 7.3.3.2 La elekto de sekciestro estas sciigata al la Estraro de la Ligo, kiu konfirmas la mandaton de la sekciestro.

- 7.3.3.3 La sekciestro havas trijaran mandaton, estas reelektebla kaj reprezentas la Ligon en la koncerna teritorio. La mandato finiĝas, same kiel tiuj de la sekciaj komitatoj, en la 31a de marto en la jaro antaŭ la elekto de nova estraro de ILEI.
- 7.3.3.4 La sekciestro respondecas pri la pago de la kotizoj por siaj sekciaj membroj antaŭ la 31a de marto kaj samtempa sendo de la membrolisto al la sekretario kaj la estrarano pri financoj de la Ligo.
- 7.3.3.5 La sekciestro prizorgas la jaran statistikon pri la instruado de Esperanto en sia teritorio.
- 7.3.3.6 La sekciestro respondas al retaj komunikoj bezonantaj respondon ene de 10 tagoj post ilia forsendo de la sekretario aŭ alia estrarano de la Ligo, kaj al tiaj fizikaj komunikaĵoj ene de 40 tagoj. La sekciestro plusendas publikajn komunikojn de ILEI al la sekciaj membroj.
- 7.3.3.7 La sekciestro informas la sekretarion de la Ligo pri la ŝanĝoj en la sekcia estraro.
- 7.3.3.8 La mandato de sekciestro finiĝas se tiu dum pli ol unu jaro ne sendis raporton pri la sekcia agado, daŭre ne plenumas taskojn en la sekcio aŭ ne zorgas pri la sekcia reprezentiĝo en komitatkunsido.
- 7.3.3.9 La Estraro povas proponi al la Komitato ĉesigi la mandaton de sekciestro.
- 7.3.4 Rerezentanto reprezentas la membrojn en teritorio sen sekcio.
  - 7.3.4.1 Rerezentanto-kandidato devas esti internacia membro de la Ligo en la jaro de la petoektrakto, kaj post akcepto, devas resti tia membro tra la tuta mandato.
  - 7.3.4.2 Rerezentanton nomumas kaj malnomumas la Estraro, informinte la Komitaton pri tio.
  - 7.3.4.3 Rerezentanto servas al la membroj kaj reprezentas la Ligon en sia teritorio kaj klopodas starigi sekcion.
  - 7.3.4.4 Rerezentanto havas trijaran mandaton kaj estas reelektebla.
  - 7.3.4.5 La mandato de rerezentanto finiĝas se stariĝis sekcio en la koncerna teritorio.
  - 7.3.4.6 La rerezentanto prizorgas la jaran statistikon pri la instruado de Esperanto en sia teritorio.
  - 7.3.4.7 Rerezentantoj respondas aŭ plusendas cirkulerojn same kiel sekciestroj.

- 7.3.4.8 La Estraro povas ĉesigi la mandaton de reprezentanto se tiu dum pli ol unu jaro ne sendis raporton pri sia agado aŭ daŭre ne plenumas taskojn en sia teritorio.
- 7.3.4.9 Kontraŭ la ĉesigo la reprezentanto rajtas apelacii al la Komitato, kiu decidas.
- 7.3.5 Sekcioj nomas komitatanojn.
- 7.3.5 Sekcioj kaj reprezentantoj nomas komitatanojn laŭ artikolo 7.1.2.
- 7.3.6 Sekcioj kaj reprezentantoj rajtas fari proponojn al la Komitato kaj rajtas nomi kandidatojn por la Estraro de la Ligo.
- 7.3.7 Ili respondecas al la Komitato pri ĉiuj siaj agoj koncerne la celojn de la Ligo.
- 7.3.7 Sekcioj kaj reprezentantoj:
- okupiĝas pri varbado de membroj kaj de simpatiantoj-donacantoj;
  - respondecas pri la korespondado kun la sekretario de la Ligo;
  - raportas skribe al la sekretario, antaŭ la 31a de marto, pri la agoj kaj atingoj de la sekcio dum la pasinta jaro, prefere pere de respondiloj kreitaj tiucele.

## **Artikolo 8**

### **LA ADMINISTRA JARO**

- 8.1 La administra jaro egalas al la kalendara jaro.

## **Artikolo 9**

### **REGULAROJ**

- 9.1 Al tiu ĉi Statuto apartenas Interna Regularo, Elektoregularo, Konferenca Regularo kaj eventualaj aliaj regularoj kaj gvidiloj.
- 9.2 La Statuto kaj la Interna Regularo devas esti publike afiŝataj; gvidiloj validas nur se ili estas publike afiŝataj. Ĉiu ŝanĝo de la Statuto kaj Regularoj devas esti registritaj en la publike afiŝataj dokumentoj.

Statuto ILEI  
Augusto 2011.doc  
Dokumento kreita: la 8an de aŭgusto 2011  
Laste modifita: la 12an de septembro 2011

Aktuala stato de la interna regularo post Kopenhago,  
la reta voĉdono de la Komitato frue en 2012  
kaj tri modifoj faritaj en Kunmingo en julio 2012 (ĉe 4.9.4, 7.1.6 kaj 7.2.2.1.  
Kompilo: SMG, la 13an de aŭgusto, 2012

Kunigo de ambaŭ dokumentoj:  
Fejfi, 2014-01-30